

ESPERANTOLEHTI


Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2014



Vintraj Tagoj en Turku

8.–9.3.2014,

p. 10–13



ESPERANTO
2013
Reilua viestintää
Rättvis Kommunikation

FEJO-semajnfino kaj la jarkunveno de FEJO, p. 6

- ♦ la 30-a Internacia Festivalo en Germanio, p. 8 ♦ Ĉokolino, p. 15
- ♦ Afrikaj vizitantoj, p. 18 ♦ La Tago de Johan Ludvig Runeberg, p. 21

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Kansi/Pärm/Kovrile: Föri (Prameto). Foto: *TO*.

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314, tiina.kosunen945@gmail.com

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Jukka Nikoskelainen, Turku

Keith (Keke) Uber, Petter Wetterin tie 4 A 36, 00810 Helsinki. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de

Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Danske Bank 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

EU-lingvopolitiko en praktiko

Millaista EU-kielipolitiikkaa?



Eŭropa Unio deklaras multlingvecon sia esenca principo. Paradokse, serĉante en la finnlingva oficiala interreta paĝo de la Unio sub ”Kielellinen monimuotoisuus” (lingva diverseco) aŭ ”Kielet ja monikielisyys” (lingvoj kaj multlingveco), la rezulto estas anglalingva paĝo kun la informo, ke ĝi dume ekzistas nur angle, kaj ke aliaj versioj estas pretigotaj.

En la finnlingva indekso estas 400–500 kapvortoj aŭ rubrikoj. Ĉe plej multaj estas signo de la lingvo(j): ofte tri, angla, franca kaj germana, ankaŭ nur du aŭ nur angla; rubrikoj kun 4–6 lingvindikoj kalkuleblas ses aŭ sep. Temoj kiel ekzemple ”Julkiset hankinnat” (publik-buĝetaj aĉetoj), ”Konkurssi” (bankroto) kaj ”Lääkkeet” (medikamentoj), do esence gravaj sociekonomie, estas nur angle.

Unu rubriko promesata germane, angle kaj france estas ”Opiskelu ulkomailla” (studi eksterlande). Provo preni la paĝon germane aŭ france tamen malsukcesas; ĝi ekzistas nur angle. Temas pri la nova programo Erasmus+ kun buĝeto de 14 miliardoj da eŭroj. La unua limdato prezenti projektojn en ties kadro estas la 17-a de marto. Anoncita tempo de publikigo de la programo en la aliaj 23 EU-lingvoj estas en aprilo. Tio donas grandan avantaĝon al denaskaj posedantoj de la angla, kiel britoj kaj irlandanoj.

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), en kiu membras ankaŭ EAF, atentigas la membrojn de Eŭropa parlamento, ke tia avantaĝo al denaskuloj de unu lingvo estas grava ofendo kontraŭ la propra politiko de EU. La buĝeton de 14 miliardoj pagas parolantoj de ĉiuj lingvoj. Egala devo baki donu egalan rajton al pano.

Eŭropa Parlamento estos reelektita en proksima majo. Kampanjoj komenciĝas-is. Certe ni ĉiuj elektos nian kandidaton kaj voĉdonos. Certe EAF kiel asocio prezentos siajn lingvopolitikajn demandojn al la kampanjantoj. Kuraĝe faru tion ĉiuj ni, kiujn justa lingvopolitiko interesas.

Euroopan unioni on periaatteessa monikielinen yhteisö, jossa kaikilla kansallisilla kielillä on yhtäläinen asema. Niinpä odottaisi, että unionin virallisella sivulla suomenkieliset hakusanat ”Kielellinen monimuotoisuus” ja ”Kielet ja monikielisyys” selvitäisivät unionin kielipolitiikkaa suomeksi. Eivätpä selvitäkään, ei suomeksi eikä muillakaan unionin 24 virallisella kielellä, vaan ainoastaan englanniksi. Sivulla on kyllä lupaus, että puuttuvat versiot kyllä ovat tulossa.

”Opiskelu ulkomailla” on luvassa saksaksi, englanniksi ja ranskaksi. Eipä olekaan: Saksan ja ranskannappuloitten napautukset tuovat nekin esiin englanninkielisen sivun. Sen tärkein tieto on parhaillaan haettavissa oleva Erasmus+-opiskelijavaihto-ohjelma. Sen ensimmäinen hakuaika päättyy 17. maaliskuuta. Tiedotusta ja ohjeita luvataan tulevan muilla kielillä – huh-tikuussa.

Erasmus+ on 14 miljardin euron ohjelma. Niitä miljardeja maksavat kaikki EU-kansalaiset, joista pieni vähemmistö on syntyperäisiä englannintaitajia. He saavat näin merkittävän etumatkan – sen lisäksi, että heidän ei ole yleensä tarvinnut sijoittaa voimia vieraan kielien opiskeluun. Näyttää siltä, että EU noudattaa huonosti itse julistamaansa kielten yhdenvertaisuuspolitiikkaa.

Toukokuussa on Euroopan parlamentin vaalit. Kampanja tarjoaa tilaisuuden esittää ehdokkaille julkisia kysymyksiä heidän kielipoliittisistakin arvoistaan, asenteistaan ja ajatuksistaan.

Tuomo Grundström

Reabonu Esperanta Finnlando por 2014! Aika uudistaa Esperantolehden tilaus

Memoru renovigi vian mendon de nia enlanda gazeto Esperanta Finnlando. Eblas mendi tra via membroasocio same kiel lastjare. La jarkunveno 8.3.2014 konfirmos la membrototizojn de la individuaj membroj kaj de la subtena asocio Societo Nino Runeberg.

Se vi estas individua membro de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF):

- Esperantolehti/Esperantobladet/Esperanta Finnlando estas inkluzivita en la (lastjare 22 eŭroj).
- Tiuj, kiuj estis membroj lastjare, ricevos de la kasisto leteron kun pagilo kaj referencnumero.
- Nova membro: informu vian nomon kaj adreson al EAF (kontaktinformoj en paĝo 2).
- La membrototizo de la subtena asocio Societo Nino Runeberg estas ĝis la jarkunveno 44 eŭroj. La estraro antaŭendankas pro via helpo.

Se vi estas membro de iu membroasocio de EAF (rigardu la liston en antaŭlasta paĝo):

- Esperantolehti kostas por vi 16 eŭrojn.
- Pagu kune kun la membrototizo laŭ la instrukcioj de via asocio.

Se vi deziras faris donacabonon aŭ mendi kromajn gazetojn por via uzo:

- Esperantolehti kostas tiam 24 eŭrojn.
- Vi povas pagi aŭ al EAF aŭ tra via membroasocio.

NOTU, KE LA NUMERO 2/2014 ESTAS LA LASTA KIUN VI RICEVAS ĈI-JARE SEN REABONO.

Ĝuu la legadon!

HONORE AL NINO RUNEBERG, LA UNUA PREZIDANTO DE EAF kaj subteno al la asocio, ALIĜU AL SOCIETO NINO RUNEBERG pagante duoblan individuan membrecon. ...kaj vi renkontos Ninon en la Vintraj Tagoj en Turku... aŭ li sendos al vi personan leteron...

Muista jatkaa Esperantolehden tilausta vuonna 2014! Jos tilaat lehden jonkin jäsenyhdistyksen kautta, ilmoita siitä samalla kun maksat jäsenmaksun. Vuosikokous 8.3.2014 vahvistaa liiton henkilöjäsenen jäsenmaksun (22 euroa viime vuonna). Suomen Esperantoliiton henkilöjäsenen (individua membro):

- Lehtimaksu sisältyy jäsenmaksuun.
- Viimevuotiset jäsenet saavat muistutuskirjeen ja viitenumeron liiton rahastonhoitajalta.
- Uusi jäsen: ilmoita osoitetietosi liittoon (yhteystiedot lehden sivulla 2).
- Liiton toimintaa voi tukea liittymällä Nino Runeberg –seuran jäseneksi. Maksu on 44 euroa vuosikokoukseen asti ja sen voi maksaa jo nyt. Kiitokset!

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestön jäsen:

- Lehtimaksu on 16 euroa.
- Jäsenjärjestöjen yhteystiedot ovat takakanen sisäsivulla.
- Maksa lehti omalle jäsenjärjestöllesi yhdessä jäsenmaksun kanssa. Hoida maksu yhdistyksen ohjeiden mukaisesti eräpäivään mennessä.

Lahjatilaukset ja lisälehdet:

- Lahjatilauksena lehden vuosikerta maksaa 24 euroa. Lisälehdillä sama hinta.
- Voit maksaa lahja/lisätilauksen joko liittoon tai jäsenjärjestösi kautta.

HUOMAA, ETTÄ LEHTI NRO 2/2014 ON VII-MEINEN, JONKALÄHETÄMME TÄNÄ VUONNA, JOS TILAUSTA EI OLE UUDISTETTU.

Hyviä lukuhetkiä!

VOIT MYÖS KUNNIOITTA A ESPERANTOLIITON ENSIMMÄISTÄ PUHEENJOHTAJAA NINO RUNEBERGIA (1878 – 1934) JA TUKEA LIITTOA MAKSAMALLA KAKSINKERTAISEN JÄSENMAKSUN. Nino – kansallisorunoilijan pojanpoika ja itsekin kirjailija ja kääntäjä – muistaa kirjeellä tai tapaamisella tällä lailla ”Societo Nino Runebergin” liittyneitä.

Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

”Kio estas Esperanto?” Jen la neevitebla demando, al kiu ĉiu esperantisto devas ade respondi, ĉu en disaj konversacioj, ĉu en la privateco de la propra cerbo.

Ni ĉiuj konas diversajn pretajn formulojn – ”lingvo internacia”, ”lingvo neŭtrale homa”, ”dua lingvo por ĉiuj”, ktp – tradicie uzatajn por tiaj klarigoj. Komence de la jaro 2014, eble venis tempo rigardi la aferon el iom pli radikala vidpunkto.

”Lingvo kun interna ideo” – tiel Zamenhof priskribis nian aferon. Sed eble pli trafa estas la iama propono de *Helmut Welger*, ke temas pri ”ideo kun interna lingvo”. Ideo samtempe pli vasta kaj pli intima, ol vortaro kaj gramatiko, ĉar ĝi koncernas nian identecon – nian homan eston.

Laŭ tiu vidpunkto, ni disvastigas anue kaj ĉefe ne lingvon, sed homaranecon. Temas pri la sento kaj sperto, ke oni mem aktive partoprenas en iuspeca tutmonda kulturo – ne simple kiel konsumanto aŭ kliento, sed kiel kunkonstruanto. Tiun senton dividas sendube dekoj da milionoj da homoj tra la mondo; inter ili, multaj apenaŭ (aŭ neniam) aŭdis pri Esperanto; multege malpli eklernis ĝin. Ili estas, tamen, en profunda senco niaj samideanoj.

Por fariĝi amasmovado, ni devos do lerni paroli kun tiuj homoj. Tio signifas ankaŭ lerni

aŭskulti ilin. Ni alportas homaranecan rigardon al la lingva sfero; ni elserĉu kaj akceptu homaranecajn kontribuojn en aliaj sferoj. La fakto, ke UEA jam de 65 jaroj emfazas la ŝlosilan gravecon de la homaj rajtoj en nia laboro por Esperanto, estas modelo de tia evoluo; sed ni ne imagu, ke tie jam finiĝas niaj devoj.

La ĉi-jara Universala Kongreso en Bonaero invitas dialogon kun ĉiuj aktivuloj por ”daŭripova estonteco” – koncepto kiu plivastigas la homaranecon por inkluzivi ĉiujn samplanedanojn, homajn kaj aliajn. Ke daŭripova mondo devas esti ankaŭ homaraneca mondo, verŝajne neniu el ni pridubas. Tamen, kiel evolui en tiu direkto – jen defio, kiu nun okupas registarojn kaj neregistarajn organizojn tra la mondo, kaj devus pensigi ankaŭ nin.

Esperanto: lingvo por daŭripova mondo. Por ke tio ne estu nur frapfrazo, ni devas labori por kompreni ĝian amplekson, ĝiajn implicojn. Ni devas fariĝi movado, kiu edukas homojn en tutmonda skalo pri la profunda rolo de la homaj lingvoj en la atingo de justeco socia, ekonomia, kaj eĉ ekologia. Kaj kie povas dialogi ĉiuj, kiuj laboras por tia mondo.

En tia kadro, ni ja rajtos konsideri nin amasmovado.

Mark Fettes, [GK 530]

Jam dudek faris KER-ekzamenon

En Finnlando jam dudek personoj KER-ekzameniĝis, aŭ komplete (skriba kaj parola partoj) aŭ trapasis la skriban parton. Ĉu vi ne volas esti inter ili? La tria Tutmonda Skriba KER-ekzameno okazos sabaton la 17-an de majo en Tampere.

Vi ne devas ekzerciĝi sola. Mi havas la gvidlibron ”Esperanto de nivelo al nivelo”, kiu enhavas ĉiujn sciojn kaj du seriojn da provtaskoj

por ĉiu ekzameno. La libro estas pruntebla. En <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj> troviĝas po unu serio kun solvoj. Kuraĝiĝu! Aliĝo okazas en la reto <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>.

Uzu la eblecon fari la ekzamenon en Finnlando! atendas vian aliĝon

*Sylvia Hämäläinen
sylvia.h@kolumbus.fi*

FEJO-semajnfino kaj la jarkunveno de FEJO – FEJO-viikonloppu ja vuosikokous

Post longa paŭzo okazos denove FEJO-semajnfino, la plej elstara aranĝo de la jaro! Ĉi-foje ni kolektiĝos en Helsinki la 1-an kaj 2-an de marto. Sabate ni okazigos vintran sportumadon, ekzemple sketadon aŭ promenadon tra la vintra pejzaĝo. Sekve ni kune manĝos en restoracio kaj vesperon ni pasigos ĉe *Andrei Dumitrescu*. Estos ebleco saŭnumi, ludi kart- aŭ tabulludojn kaj spekti filmojn – en Esperanto!

La horaro detaliĝos pli proksime al la aranĝo, kaj por certigi vian ĝustatempan partoprenon aliĝu retpoŝte al Paula (*paula.niinikorpi@gmail.com*). Ni organizos ankaŭ tranoktejon por tiuj, kiuj venos el ekster Helsinki, do aliĝante informu pri via bezono por tranoktejo.

Dimanĉe okazos la laŭstatuta jarkunveno de FEJO ekde la 11-a horo en la oficejo de EAF.

Hiljaiselon jälkeen FEJO järjestää jälleen vuoden hauskimman tapahtuman: FEJO-semajnfino!

Tällä kertaa kokoonnumme Helsinkiin 1.–2. maaliskuuta. Lauantaina luvassa on talviurheilua esimerkiksi luistelun tai talvisen kävelyretken merkeissä. Jatkamme yhteisellä aterialla ja iltaa vietetään Andrei Dumitrescun luona saunoen, peli-iltaa viettäen ja esperantonkielisiä elokuvia katsellen.

*Aikataulu tarkentuu lähempänä ajankohtaa. Varmistaaksesi paikallaolosi oikeaan aikaan ilmoittaudu sähköpostitse Paulalle (*paula.niinikorpi@gmail.com*). Järjestämme majoituksen Helsingin ulkopuolelta tuleville, joten ilmoittahan majoitustarpeestasi sähköpostissa.*

Sunnuntaina on FEJOn sääntömääräinen vuosikokous klo 11 alkaen EAF:n toimistolla.

Bonvenon! Tervetuloa!

Paula Niinikorpi



Sumoanoj de la Granda Ursino, Svislando, Foto: *Mónika Molnár*

El Finnlando en la januara sumoo partoprenis rekorde 7 luktistoj, ĉiuj plensukcese: *Fringo, Puntanto, Pronomo, Saliko, Siru, Lingvulino kaj Tuomo*.

La sekva sumoo okazos de la 9-a ĝis la 23-a de marto.

Pliaj informoj kaj kiel partopreni la Sumoon rigardu ĉe www.esperanto-sumoo.strefa.pl

Januara sumoo

Mirinda letero el lernejo en Svislando atingis HORI Jasuon, gvidanto de la Esperanta Sumoo por konkurse legi Esperantan libron:

Esperanto-societo en Turku

Esperanto-societo en Turku (EST) havis la laŭstatutan jarkunvenon 2-an de februaro 2014 en la Civitana instituto de *Aurala*.

Elektitaj funkciuloj: *Tiina Oittinen*, prezidanto, *Anna-Liisa Ali-Simola*, vicprezidanto,

Leena Tiusanen, sekretario,

Veikko Tikkanen kasisto kaj estrarvicmembro.

Aliaj estrarmembroj: *Paula Harju*, *Väinö Havu*, *Anja Launiainen*, *Kari Pyykkö* kaj vicmembroj *Merja Uotila* kaj *Eeva Nikoskelainen*. Agadkontrolantoj: *Orvo Haavisto* kaj vice *Ilpo Forsström*, *Ulla Salonen* kaj kaj honore *Jorma Ahomäki*.

Ĝis komence de aprilo funkcias nia kurso marde en *Aurala*. Printempe kaj some-re daŭrigas pli-malpli regule ankaŭ la merkredaj renkontiĝoj en la kafejo *Sirius* de la ĉefbiblioteko. Gastoj estas ĉiam bonvenaj. Informiĝu ĉe EST-anoj pri datoj, kontaktuloj estas sekretario de EST *Leena Tiusanen* (tel. 050-5757 956, *leena.tiusanen@elisamet.fi*) aŭ la prezidanto *Tiina Oittinen* (*tiina.oittinen@*

pp.inet.fi, tel. 050-5494 709).

Kaj nature ni bonvenigas vin ĉiujn al la Vintraj Tagoj en Turku. Niaj esperantlingvaj ĉiĉeronoj gvidos vin.

Turun Esperanto-yhdistyksen hallituksen jäsenet näet esperantokielisestä osuudesta.

Tapaamme viikottain joko Auralan kielikurssilla (tiistaisin klo 15.30–17.00 huhtikuun loppuun) tai pääkirjaston kahvila Siriuksessa (keskiviikkoisin noin klo 16.30–17.30). Liiton talvipäivien yhteydessä yhdistyksen esperantonkieliset oppaat opastavat ns. siltakerroksen ja vievät vieraat WA-museoon lounaalle ja sen jälkeen taidemuseoon Emil Wikström -näyttelyyn.

Vierailijat tervetulleita, varmista kuitenkin aika ja paikka! Lisätietoja joko siht. Leena Tiusaselta, puh. 050-5757 956, leena.tiusanen@elisamet.fi tai pj. Tiina Oittiselta, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai puh. 050-5494 709.

Saluton kara Jarmo,

Jen niaj rezultoj kun preskaŭ plena sukceso. Estas nur Juliette (Malgranda Bruna), kiu ne povis legi unu tagon, ĉar ŝia libro restis en la lernejo. Ŝi provis tamen fari ĝin telefonante al amiko, kiu legas la saman libron por peti foton pri la bezonata paĝo. La amiko sendis la foton, sed la kvalito de la foto estis tiom malbona, ke ŝi ne sukcesis legi ĝin, do tiun paĝon ŝi povis legi nur venontage kune kun la tiutaga paĝo... Kion fari? Jen la malbonŝanca historio. Krom ŝi, ĉiuj aliaj povis plenumi la defion.

Kun la finaj rezultoj mi sendas al vi ankaŭ foton pri miaj legantaj gelemantoj, kiuj montras siajn aktualajn librojn.

Pluse, mi sendas al vi ankaŭ voĉmesaĝon, en

kiu ĉi-matene mi registris la voĉon de miaj 3 plej junaj partoprenantoj. Ilin vi povas vidi en la unua vico sur la foto:

- la unua estas Allan, 11-jara, en blanka pulovero (atentu, apud li Mattias estas nur malalta knabo, sed pli aĝa ol Allan)
- la tria estas Lucie, 8-jara, en violkolora pulovero
- la kvara estas Chiara, 11-jara, en nigra pulovero.

Jen estas tiuj tri junuloj, kiuj salutas vin en la registraĵo.

Fine akceptu ankaŭ miajn gratulojn por via granda laboro! Dankon!

*Amike salutas vin,
Mónika*

Pli longa adiaŭo: la 30-a Internacia Festivalo en Germanio

Oettingen.



Jen ĝi venis, la jubilea 30-a Internacia Festivalo, jarŝanĝe 2013 denove en *Nördlingen* – tiu bavara urbeto konstruita en meteorkratero kun la sola komplete trairebla mezepoka urbomuro.

La ĉirkaŭ 120 venintoj (tamen ja kelkaj novuloj) jam scias, kio atendas ilin: la knajpo, centra renkontiĝejo kaj t(d)rinkejo, kie eblas kunesti ĝis post la 4-a horo matene; abunda libroservo de FEL; babilo kun konatoj el dekoj da landoj; la riĉa programo kun foja elekto inter kelkaj paralelaj eroj.

Gravan parton konsistigis la 8-a Internacia Kongres-Universitato kun prelegoj ia. de *Amri Wandel* (profesoro de astronomio en la universitato de Jerusalemo pri Aŭroroj, Esperanto ĉe



Bardoj.

Guglo kaj Vizaĝlibro), *Jozef Reinwart* (vicambasadoro kaj parlamentano pri Slovakio kiel modela EU-lando rilate al reta multlingva instruado), *Thomas Bormann* (jurnalisto de la germana radio en Turkio pri Cenzuro sen cenzuristoj), *Ian Fantom* pri Novparolado ĉe *Orwell*. Ankaŭ *Stefan MacGill* prezentis retkurson de ILEI kaj iom detaligis la Strategian Laborplanon de UEA:

Eblas spekti ukrainan pupteatron, aŭskulti rusajn bardojn, partopreni en kursoj kaj multe pli – aŭ simple promene esplori la urbeton, grimpi sur la

turon *Daniel* de la urbocentra katedralo S-ta Georgo. Kompreneble iuj ĉifoje aparte foliumis fotoalbumojn de pasintaj IF-oj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al *Rothenburg ob der Tauber*, prototipo de mezepoka urbo por multaj turistoj. La tiea institucio "Käthe Wohlfahrt" – vendejo por kristnaskaj ornamaĵoj – aŭ rigardo de la stratoj estis interesaj.

Pinto de IF estas la Silvestra Bufedo kun sia abunda elekto kaj Silvestra Balo, kun la kutima dancado de polonezo en belaj kostumoj. La jarŝanĝo estas anoncata plurfoje laŭ la diversaj tempozonoj de la devenlandoj.

Daŭrigantoj je la 3-a de januaro spertis ekskurson al la proksima urbeto *Oettingen* (konata pro tiunoma biero) kun rondiro kaj posta kafumado.

Laŭ la organizanto *Hans-Dieter Platz* (kutime mallonge HDP) devintus esti lia lasta aranĝo, sed pro malfermo de nova junulargastejo ankaŭ vi povos sperti la lastan, 31-an IF-on en *Jülich* inter Kolonjo (kun flughaveno) kaj Akeno inter 27.12.2014 kaj 3.1.2015. Ekzistas firma volo poste daŭrigi tian jarŝanĝan aranĝon por nejunuloj sub aŭspicio de GEA – ĝis revido do ĉiuokaze en Germanio!

RB

Omaĝo al Raimo Tanskanen



Raimo Tanskanen ludas, Aatu Moilanen kantas kaj Sune Huldin atendas sian vicon por prezenti novan telefonon.

La 7-an de januaro 2014 en la oficejo de svedlingva blindulorganizajo FSS (*Förbundet Finlands Svenska*

Synskadade) okazis tradicia festeto por levi la konon de la brajla skribo en nuntempo, kaj aljuĝi "brajlouzanton de la jaro".

Kelkfoje oni pensas ke brajlo malaperos, sed ĉiam post silenta periodo la brajla skribo retrovis renesancon. Efektive brajlo daŭre sekvas la teknikan evoluon. Tio koncernas nun precipe porteblan telefonon. S-ro *Sune Huldin* kun entuziasmo prezentis t.n. Iphone-aparaton. En la festeto ĉeestantoj povis konatiĝi kun tiu eta telefono pere de kiu eblas skribi kaj sendi mesaĝojn ankaŭ en brajlo. Ricevanto povas aŭskulti mesaĝojn kaj legi platskribajn mesaĝojn.

Kiel "brajlouzanto de la jaro 2013" estis aljuĝita Steleto-ano *Raimo Tanskanen*, dir. mus. (director musices). Raimo estas la 12-a pere de tiu ĉi diplomo omaĝita homo. Por Raimo la brajla skribo havis ege gravan signifon en laboro, studoj kaj hobiaj. Kiel profesia muzikisto brajlaj muziknotoj estis kondiĉo por lia sukcesa kariero.

Raimo laboris kiel muzikisto, komponisto, pedagogo, estro de korusoj kaj orgenisto. Eblas konsideri lin kiel belegan ekzemplon de la signifo kaj eblecoj de brajlo.

Ni aŭdis, ke Raimo verkis finnan sistemon por mallongigi la brajlan skribon. Kvankam la sistemo mallongigas tekston po unu triono, ĝi ne sukcesis allogi ĉe ni multnombrajn brajlouzantojn.

Pianoludado de Raimo kaj gaja kantado de *Aatu Moilanen* kompletigis agrablan etoson.

Plurajn jarojn Raimo prezidis Steleton. Multaj esperantistoj konas lin kiel membro de tri kantantaj kamaradoj – Aatu Moilanen, *Arvo Karvinen*, Raimo Tanskanen – kiuj ekde la lernejoj jaroj en la blindulleteroj kantis kune. La grupo "Tri fiŝkaptistoj" kunportis ĝojon en esperanto-kongresoj kaj privataj festetoj.

Antaŭ kristnasko la kultura blindulasocio (*Näkövammaisten Kulttuuripalvelu*) publikigis diskon "Kiurun tupa" (nesto de alaŭdo), kiu enhavas komponaĵojn de Raimo Tanskanen. Pere de tiu disko la koruso *Kamarikuoro Kontrapunkti* honoras la iniciatinton, fondinton de la kultura blindulasocio.

Eble interesas scii, ke pasintaŭtune aperis la libro "Raimon tie Polvijärveltä Pomarkkuun", verkita de *Aino Marjatta Kallio*.

Gratulon al Raimo okaze de la omaĝo! Ni estas fieraj kaj deziras fortojn, sanon kaj daŭran inspiron en la ŝatokupoj.

Ritva Sabelli

Runebergaj tortetoj

La recepton mi lastjare jam sendis al kelkaj korespondamikoj. Frandan Runeberg-tagon!

3 dl da faruno	2 ovoj
2 kuleretoj da bakpulvoro	100 gr da hakitaj migdaloj
2 kuleretoj da kardamomo	2 dl da paneroj
200 gr da butero	2 dl da kremo
2 dl da sukero	

(por iom malsekigi la bakitajn tortetojn gutigu post la bakado iom da punĉo aŭ konjako sur ilin)

Por omami: frambo-konfitaĵo, kiun oni ĉirkaŭu per densa blankaĵo farita el fajna sukero, akvo kaj citronosuko. Kunmiksi la buteron kaj sukeron, aldonu la ovojn po unu, ĉiam bone kirlante. Enmiksi la aliajn ingrediencojn vice kun la kremo. Plenigu mufin-formojn (eble 14–16), baku en forno 225-grade dum 12–15 minutoj. Lasu malvarmiĝi. Ensbigu iom da sukerita akvo aŭ alkoholaĵo, vidu supre. Metu sur ĉiun torteton iom da konfitaĵo kaj ŝprucigu blankan cirkon ĉirkaŭ la konfitaĵon. Manĝu kun kafe aŭ io alia.

Esperantigis Saliko

Vintraj Tagoj – Talvipäivät

Turku 8.–9.3.2014

Kunvenejo: salono de NNKY, adreso:

Vähä Hämeenkatu 12, Turku

Kokouspaikka: NNKY:n sali, osoite: *Vähä Hämeenkatu 12, Turku*

Temo: Akademio respondas ankaŭ en Finnlando

Aihe: Esperantokielen akademia toimii myös Suomessa

Programo – Ohjelma (*ŝanĝoj eblas - muutokset mahdollisia*)

Vendredo / Perjantai, 7.3.2014

17.00–18.30 en la ĉefbiblioteko, **salono Studio**, Linnankatu 2: Publika aranĝo kun prezentado de Esperanto kaj diskuto pri lingvaj aferoj.

Turun pääkirjaston Studio-salissa, Linnankatu 2: Yleisötilaisuus, jossa esperanton kielen ja kulttuurin esittelyä sekä keskustelua kieliasioista. Lue tilaisuudesta tarkemmin sivulta 15.

Sabato / Lauantai, 8.3.2014

10.00–12.00 Kunvenoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj. Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia.

12.00–13.00 Lunĉo. Aliĝu al komuna lunĉo en rest. **Teini, proprakoste**. Lounas. Ilmoittaudu yhteiselle omakustanteiselle lounaalle rav. Teinissä.

13.00–13.15 Malfermo de la Tagoj. Libroservo malfermita. Päivien avaus. Kirjamyyntipalvelu.

13.15–14.00 Presentado de la venonta UK-lando kaj urbo **Bonaero**. Vuoden 2014 maailmankongressi Argentiinan Buenos Airesissa (esperantoksi Bonaero).

14.00–14.30 Malstreĉiĝo helpe de jogo. Gvidas **Aila Nieminen el Turku**. Joogarentoutushetki Aila Niemisen johdolla.

14.30–15.00 Kafo. Kahvi.

15.00–17.00 Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus).

17.00–17.30 Paŭzo. Tauko.

17.30–18.30 Akademio respondas -podio: **Jouko Lindstedt kaj Harri Laine**, gvidas **Tuomo Grundström**. Kiel en UK, demandoj skribe, ne diskuto. Esperantokielen akatemian jäsenet Jouko Lindstedt ja Harri Laine vastaavat kirjallisesti esitettyihin kysymyksiin. Vetäjä Tuomo Grundström.

18.30–19.00 Muzika momento, komuna kantado, ktp. *Musiikkituokio, yhteislaulua, ym.*

19.30– Komuna vesperumo kun manĝo en rest. **Koulu (Lernejo)**. Anoncu vin por la vespermanĝo, al la restoracio senpaga eniro. Yhteinen illanvietto ja illallinen rav. Koulussa. Ilmoittaudu illalliselle, muuten rav. Kouluun vapaa pääsy.

Dimanĉo / Sunnuntai, 9.3.2014

9.00–10.45 Libroservo en salono de NNKY. Kirjapalvelu NNKY:n salissa.

10.00–11.00 Diservo en la katedralo de Turku. Jumalanpalvelus Turun tuomiokirkossa.

11.00–11.30 Mallonga ĉiĉeronado en la katedralo. Lyhyt opastettu kierros tuomiokirkossa.

11.30–12.30 Piedira promedado surborde de **Aura-rivero**, rakontoj pri la pontoj: Unua ponto, nova biblioteka ponto, Myllysilta-ponto kun novaj statuoj ambaŭflanke. Kävely Auraajoen rannalla, kertomuksia silloista: Ensimmäinen silta, uusi kirjastosilta, Myllysilta ja sen uudet taideteokset.

12.30–12.45 Muzeo de **Wäinö Aaltonen**, vizito en la aŭlo, kie sur la muro multlingve la poemo de WA. Fermo de la tagoj. Tutustuminen WA-museon aulaassa olevaan monikieliseen runoon. Päivien päätös.

12.45–13.30 Lunĉo (fiŝosupo) aŭ kafo en WA-kafejo (antaŭmendo). Keittolounas tai kahvi Wäinö Aaltosen museon kahvilassa (etukäteisilmoitus).

14.00– Vizito al Arta muzeo de Turku kun ekspozicio de **Emil Wikström**. Tutustuminen oppaiden johdolla Turun taidemuseon Emil Wikström -näyttelyyn.

Vintraj Tagoj 2014

Vintraj Tagoj en marto 2014 alvokas vin al Turku por tritaga aranĝo kun publikaj kaj internaj renkontiĝoj. Ni konatiĝos kun akademiaj aferoj de la Esperanto-movado kaj havos surloke niajn enlandajn akademianojn *Jouko Lindstedt* kaj *Harri Laine*. Vendrede 7.3. estos je la 17-a horo publika aranĝo en la *salono Studio* de la ĉefbiblioteko kun prezentado de Esperanto kaj diskuto pri lingvaj temoj. Pliaj informoj de la aranĝo finnlingve sur paĝo 15.

Nia kunvenejo dum la semajnfino estos la salono de NNKY en la strato *Vähä Hämeenkatu* tuj malantaŭ la katedralo. Sabate ni havos tie diversajn travivaĵojn kaj por la korpo kaj por la animo. Post la jarkunveno de EAF, kie ankaŭ la estontaj aferoj estos deciditaj, la podio estos malferma por niaj akademianoj, kiuj sammaniere kiel dum la UK respondos al viaj demandoj donitaj surpapere. Pensu jam antaŭe taŭgajn demandojn! Kaj kompreneble ĉeestos libroservo de EAF kaj vendado de brokantaĵoj de EST.

Dimanĉo estos tago por vidi la urbon el turisma vidpunkto. Post la diservo en la katedralo kaj ĝia prezentado niaj profesiaj ĉiĉeronoj gvidos vin tra ambaŭ flankoj de la rivero Aura. Temas pri la pontoj kiuj helpas la uzadon de la rivero: en decembro estis malfermita la plej nova ponto de la urbocentro: la biblioteka ponto (finne: Kirjastosilta). Ni marŝos ĝis la novkonstruita Myllysilta-ponto (ponto de la muelejo), rigardos tie la novajn statuojn de *Kari-Petteri Kakko* kaj poste iros al la muzeo de Wäinö Aaltonen por admiri la poemon, kiu estas ĉizita ankaŭ esperantlingve sur la muro (la poema teksto sur paĝo 14). Laŭ antaŭmendoj eblos lunĉo (fiŝosupo kun salato, pano, kafo) aŭ kafumado en la muzeo. Poste, tiuj kiuj havas tempon, povos sekvi niajn ĉiĉeronojn al la arta muzeo por vidi la ekspozicion honore al la 150-a datreveno de la skulptisto *Emil Wikström*, legu pli pri li sur paĝo 14. Esperanto-societo en Turku kune kun Esperanto-Asocio de Finnlando bonvenigas vin ĉiujn al la Vintraj Tagoj en Turku! ▶▶

ALIGILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 8.–9.3.2014 en salono de NNKY, Vähä Hämeenkatu 12, Turku

Nomo: _____

Adreso: _____

Tel./Fakso/Ret-adreso: _____

Aliĝkotizo (enhavas kafon sabate):

22 EUR..... ĝis 20.2.2014 _____

28 EUR..... poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

Lunĉo sabate (10–25 EUR): _____

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj):

Vespermanĝo sabate (10–25 EUR): _____

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj):

Rondirado dimanĉe (aliĝo petata): _____

Lunĉo dimanĉe en WA-muzeo (8,80 EUR): _____

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj):

Entute pagenda al la konto de EAF: _____

Pagoj al la konto:

Sampo FI11 8000 1700 2308 25

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

Pliaj informoj aŭ deziroj aŭ demandoj (eblas sendi rekte al kontaktuloj): _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65

FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENONI!



Venontaj

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 8.–9.3.2014, NNKY:n sali, Vähä Hämeenkatu 12, Turku.

Nimi: _____

Osoite: _____

Puh./fax/sähköposti: _____

Ilmoittautumismaksu (sis. kahvin lauantaina):

22 EUR.....20.2.2014 asti ____

28 EUR.....20.2.2014 jälkeen ____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Lounasvaraus lauantaina (10–25 EUR): _____

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

Illallinen lauantaina (10–25 EUR): _____

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

Opastettu kierros sunnuntaina (ilmoittaudu): _____

Lounas sunnuntaina WA-museossa (8,80 EUR):

____ (maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

Maksut yht. Suomen Esperantoliiton tilille: _____

Tilinumero:

Danske Bank FI11 8000 1700 2308 25

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viitetäi viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä (voit lähettää myös suoraan yhteyshenkilölle): _____

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65

FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

Talvipäivät 2014

Suomen Esperantoliiton talvipäivillä Turussa maaliskuussa 2014 on tapahtumia kolmena päivänä sekä meille että muille. Perjantaina 7.3. klo 17–19 järjestettävässä yleisötillaisuudessa esittelemme esperantoa suurelle yleisölle. Mukana on useita aktiivisesti esperantoa käyttäviä jäseniämme eri puolilta maata. Tapahtuman tarkempi esittely sivulla 15.

Viikonlopun kokouksemme pidämme NNKY:n kokoustilassa Vähä Hämeenkadulla tuomiokirkon läheisyydessä. Siellä pidetään liiton tärkeä vuosikokous, jossa saadaan suunnitelmat ja suuntaviivat tuleville vuosille. Paikalla on sekä liiton että paikallisen yhdistyksen kirjapalvelu.

Lauantain ohjelmassa on joogaa ja tietoja ensi kesän maailmankongressista. Päivän loppuksi Esperantokielen akatemian jäsenet Jouko Lindstedt ja Harri Laine vastaavat kysymyksiimme samalla tavalla kuin maailmankongressin vastaavassa tilaisuudessa: kysymykset esitetään kirjallisena eikä yleisö kommentoi akatemian jäsenen vastauksia. Miettikää jo nyt kysymyksiä! NNKY:llä on vielä musiikkia ja yhteislaulua, minkä jälkeen iltaa voi jatkaa ravintola Koulussa.

Sunnuntaina tutustumme kaupungin nähtävyyksiin esperantonkielisten ammattioppaidemme johdolla (tarvittaessa myös suomeksi). Tuomiokirkko esitellään jumalanpalveluksen jälkeen ja sen jälkeen kävelemme Tuomiokirkkosillalta Myllysilälle. Matkalla oppaat kertovat siltojen synnystä ja käytöstä sekä niihin liittyvistä tarinoista. Näemme mm. Turun uusimman sillan, viime joulukuussa avatun Kirjastosillan sekä tietenkin uudelleenrakennetun Myllysilan jota kaunistaa Kari-Petteri Kakon patsassarja *Tähtiin tähyävät*.

Kierros päättyy Wäinö Aaltosen museoon, jonka seinässä on taiteilijan runo monella kielellä, myös esperantoksi (runon teksti s. 14). Museon kahvilassa voi ennakoilmoituksen mukaan syödä lounasta tai nauttia kahvia. Ne, jotka ehti-

vät, voivat vielä vierailta oppaiden kanssa Emil Wikströmin 150-vuotisjuhlanäyttelyssä Turun taidemuseossa. Lue lisää s. 14.

Turun Esperanto-yhdistys yhdessä liiton kanssa toivottaa kaikki tervetulleiksi talvipäiville Suomen Turkuun!

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo en Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencon numeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT.

La tranoktadon ĉiu aranĝu mem. La kotizoj ne enhavas la lunĉojn aŭ la vespermanĝon, vi devas aparte pagi ilin surloke. Sed sciigu al ni pri vi partopreno, por ke ni sciu kiom da vi estos. Treege gravas aliĝo por dimanĉa lunĉo en la muzeo de WA!

Kun eventualaj demandoj vi povas turni vin al estraranoj de EAF kaj al EST-anoj. Pri kunvenaj kaj programaj aranĝoj respondas Tuomo Grundström kaj Tiina Oittinen.

Turku-anoj Leena Tiusanen kaj Tiina Oittinen povos helpi koncerne al veturiloj kaj tranoktejoj en Turku. Krome ili povos informi vin pri la manĝejoj kaj aliaj aferoj.

Pri jarkunvenaj demandoj estas je via dispono Tuomo Grundström. Tiina Kosunen kune kun aliaj prizorgas pri la aliĝiloj kaj pagoj.

Kontaktinformoj de EAF-estraranoj estas sur paĝo 2. Kontakto al sekretario de EST: Leena Tiusanen, leena.tiusanen@elisanel.fi, tel. 050-5757956.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi sekä maksa osallistumismaksu liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka

kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä; tarvitsemme myös tiedot siitä, mihin olet tulossa mukaan.

Paikat lounaille ja illalliselle varaamme etukäteisilmoitusten mukaan ja voi olla hankala saada niitä enää paikan päällä. Ilmoittautumisten mukaan varaamme myös kahvit, teet ja kahvileivät kokoustilaan. Majoittumisen jokainen hoitaa tällä kertaa itse.

Talvipäiviin liittyviä asioita voi kysyä meiltä Turun yhdistyksen tai liiton toimihenkilöltä seuraavasti: Vuosikokous ja omien kokousten tilavaraukset: Tuomo Grundström, Tiina Oittinen ja muut liiton toimihenkilöt. Ohjelmatiedot: Tuomo Grundström ja Tiina Oittinen. Raha-asiat: Tiina Kosunen.

Turkuun tuloon tai majoittumiseen sekä lounaisiin ja illalliseen liittyvät asiat: Leena Tiusanen ja Tiina Oittinen.

Suomen Esperantoliiton toimihenkilöiden yhteystiedot ovat sivulla 2. Turun Esperanto-yhdistyksen sihteeri: Leena Tiusanen, leena.tiusanen@elisanel.fi, tel. 050-5757956.

Seuraa verkkosivua www.esperanto.fi.

Bonvenon – Tervetuloa!

Esperanto-Asocio de Finnlando kaj Esperanto-societo en Turku



Kari-Petteri Kakko: Huomenna (Morgau). Foto: TO.

Kiu estis Emil Wikström?

La skulptisto Emil Wikström (1864–1942) estis unu el la artistoj de la t.n. ora periodo de Finnlando fine de la 19-a jarcento. Li naskiĝis en Turku kaj komencis artajn studojn en *Turun piirustuskoulu* (desegna, arta lernejo en Turku) kaj daŭrigis eksterlande, ekzemple en Parizo kaj Vieno.

Komence de lia skulptista kariero li gajnis la konkurson pri ornamajo al ekstera muro de la tiama parlamenta domo (*Säätytalo*) en Helsinki. Post tio li rapide fariĝis la skulptisto plej uzata en la aŭtonoma grandprinclando kaj lia realisma kaj serioza stilo plaĉis al multaj. Inter liaj famaj grandaj monumentoj estas ekzemple la *Laternoportantoj* (*Lyhdynkantajat*) de la stacidomo en Helsinki, nuntempe konataj ankaŭ kiel la ŝtonaj viroj (atlantoj).

En la arta muzeo de Turku estas ĉi-printempe jubilea ekspozicio de Emil Wikström 150 jaroj post lia naskiĝo. La ekspozicio kun la nomo *Kiveen hakattu kauneus* (beleco hakita en la

ŝtonon) montras al ni la molan flankon de la skulptisto. Wikström havis 3 filinojn, kiuj ofte estis modeloj de liaj romantikaj skulptaĵoj, faritaj lerte kaj bele.

Dimanĉe post la lunĉo ni povos viziti la ekspozicion kun niaj esperantlingvaj ĉiĉeronoj. Enirpago al la arta muzeo estas 8 eŭroj. Bonvenon!

Sunnuntaina talvipäivien lounaan jälkeen vierailemme Emil Wikströmin 150-vuotisjuhlanäyttelyssä, Kiveen hakattu kauneus, jossa on esillä tämän kultakauden kuvanveistäjän vähemmän tunnettuja teoksia. Niissä nähdään suurista monumenteistaan (mm. Helsingin aseman Lyhdynkantajat ja Kansallismuseon Karhu) kuuluisan taiteilijan pehmeämpää puolta, kun hän kuvaa mm. perhettään usein hyvinkin romanttisesti. Turun matkailuoppaat opastavat esperantoksi ja tarvittaessa myös suomeksi. Museon pääsymaksu 8 euroa. Tervetuloa!

La poemo de Wäinö Aaltonen

En la enirhalo de la muzeo de Wäinö Aaltonen estas ĉizita sur la muro poemforma sentenco de Wäinö Aaltonen. En 1995 okaze de la antaŭkongreso de la samjara UK en Finnlando la teksto ekestis tie ankaŭ Esperantlingve. Inicianto estis la Esperanto-societo en Turku, kiu ricevis subvencion de FES al la laboro, kiun la muzeo lasis fari.

Vuonna 1995 kaiverrutettiin Wäinö Aaltosen museon eteisaulan kiviseinään 10 muunkielisen tekstin joukkoon myös esperantonkielinen versio Wäinö Aaltosen tunnetusta runomuotoisesta mietelmästä. Tekstin käänsi Veikko Tikkanen. Yhdistys hankki tukea kaiverrustyöhön Fondumo Esperanto –säätöiltä, työn teetti WA-museo.

Runon teksti suomeksi:

Minä tahtoisin, että sydämeni olisi kuin kivi,
kuin kallio, johon olisi veistetty kasvot,
hymyilevät ja suuret, joiden ohi kiittää aika.
Mutta se ei ole sellainen, ei ole!
Sitä pusertaa tuska, sen juuria kalvaa ikävä
ja se tuntee sellaisen helvetinmoisen riemun.

Esperante, tradukis Veikko Tikkanen:

Mi volus, ke mia koro estu kiel ŝtono,
kiel roko kun elskulptita vizaĝo granda kaj ridetanta,
kiun fluge preterpasas la tempo.
Sed ĝi ne estas tia, ne estas!
Ĝin premas doloro, ties radikojn ronĝas nostalgio
kaj ĝi sentas ian inferan ĝojon.

Ĉokolino

Iam estis knabeto, kiun ĉiuj nomis Ĉokolino, ĉar ŝia haŭto estis tiel bruna kiel ĉokolado. Ŝi estis bela kaj tre inteligenta, sed ŝi havis grandan problemon: ŝi ne ŝatis dividi siajn ludilojn. Se Klasiĵo petis ŝian pupon, Ĉokolino respondis: "Nun mi ne povas". Se Sugango volis la ludilon, Ĉokolino respondis: "Nun mi ne povas".

Iun nokton Ĉokolino legis libron en sia lito. Kiam ŝi aŭdis, ke iu frapetis ĉe la fenestro de ŝia ĉambro, Ĉokolino rigardis tra la vitro de la fenestro kaj vidis maljunulinon, kiu vokis ŝin. Ĉokolino malfermis la fenestron. En tiu momento la maljunulino demandis ŝin: Ĉu vi deziras havi la plej belajn ludilojn por vi mem? La knabeto rapide respondis: Jes!

La maljunulino donis al ŝi sian dekstran manon kaj komencis paŝi kun ŝi tra nekonata vojo. Fine de la vojo aperis granda kaj brila pordo. Ili eniris kaj Ĉokolino tre surpriziĝis, ĉar tie estis la plej belaj ludiloj el ĉiaj landoj, nur por ŝi.

Ĉokolino estis tre gaja kaj feliĉa kun tiuj ludiloj. Sed ŝi ne perceptis ke la maljunulino malaperis. Ĉokolino ludis kaj ludis dum kelkaj ho-

roj. Poste ŝi komencis enui, ŝi ne sciis kion fari. Baldaŭ ŝi komencis plori, ĉar ŝi estis tre sola en tiu nekonata loko. Ŝi sentis la mankon de Klarinĵo kaj Suganĵo. Ŝi ege deziris ludi kun ili kaj ŝi komencis krii kaj laŭte voki la maljunulinon. Sed la maljunulino ne respondis.

Tiam aperis granda horloĝo, sidanta sur ŝtonego, kaj mokis la knabinon. Rin, rin, rin, hahaha! "Ĉu vi ne deziris ludi sola per la ludiloj? Hahaha. Nun vi restos sola."

La sonondo de la horloĝo daŭrigis sian rin, rin, rin, sed en tiu momento Ĉokolino aŭdis voĉon kiu diris: "Mi estas tuj kun ili, sed unue mi devas trovi tiujn ludilojn en la skatolo, ĉar mi volas, ke miaj amiketoj estu feliĉaj ludante per ili. La patrino komprenis nenion, sed ŝi estis tre feliĉa ĉar Ĉokolino deziris dividi siajn ludilojn.

Verkis la infangrupo "Amiketo de kolibrido" el Kubo, gvidataj de Jose de J. Campos Pacheco kaj Maria Julia Cardenas Capiro. Nomoj de la infanoj: Juan Carlos Triana Alfonso, Laura Isabel Moreno Mista, Marcos Antonio Alzugaray Martinez kaj Karlo Lutermano.

Monikielisys ja esperanto

Suomen Esperantoliiton talvipäivien yhteydessä on kaupunginkirjaston **Studio-salissa** (Linnankatu 2) **perjantaina 7.3.2014 klo 17.00–18.30** johdantopuheenvuoroja ja keskustelua aiheesta **Monikielisyys ja esperanto**.

Teemaa käsitellään sekä teoreettisesta että käytännön näkökulmasta yhteiskunnallisena ja perheilmionä. **Mitä monikielisyys merkitse Ludwik Zamenhofille (1859–1917), "Tohtori Esperantolle"? Mitä yhteiskieli**

merkitse laatijalleen ja mitä monikielisyys merkitsee esperantoliikkeelle?

Johdantopuheenvuoron pitävät Zamenhofin suomenkielisen elämäkerran toimittanut Tuomo Grundström, Esperantoakatemiaan jäsen professori Jouko Lindstedt ja monikielisyysperheissä elävät Mikko Mäkitalo ja Anna Ritamäki-Sjöstrand.

Tilaisuus on ilmainen ja kaikille avoin.

Kesäinen esperantokurssi – Somera Esperanto-kurso Orivesi 14.–18.7.2014



Oriveden Opisto.

Kesällä haluamme tavata muita esperantisteja, eikä niin. Se käy hyvin Orivedellä. Sinne tulee ainakin yksi ulkomaalainen, opettajamme Gražina Opulskienė Liettuasta. Lue hänestä lisää muualta tässä lehdessä. Hän opettaa esperantoksi, ja sehän on hyväksi meille. Tänä vuonna järjestämme alusta asti oman suomenkielisen ryhmän niille, jotka sellaista haluavat ja aloittelijoille. Opetus on niissä suomen kielellä. Gražina esittelee koko ryhmälle kotimaataan Liettua ja kertoo, mitä L.L. Zamenhof teki Liettuassa. Opiskelun lisäksi laulamme, pelaamme ja teemme jonkun retken. Huoneissa on oma WC-suihkuhuone.

Kurssi alkaa maanantaina 14.7. klo 11.30 lounaalla, jonka jälkeen klo 13 on koko opiston yhteinen kurssin avaus. Tämä kesätapaamisemme päättyy perjantaina 18.7. iltapäiväkahviin n. klo 13.30.

KURSSIMAKSUT, kolme mahdollisuutta

- 420 EUR, sisältää opetuksen, asunnon ja ruokailut (aamiainen, lounas, iltapäiväkahvi, iltapala)
- Lisämaksu yhden hengen huoneesta on 100 EUR.
- 380 EUR opetus ja ruokailut (ei asumista)
- 316 EUR vain opetus. Opiston ruokalassa on mahdollisuus syödä ja maksaa erikseen.

ILMOITTAUTUMINEN 27.6.2014 mennessä. Ilmoittaudu suoraan Oriveden Opistoon. Tuo 27.6. on opiston ilmoittama päivä. Meille järjestäjille se on liian myöhäinen. Ole hyvä ja kerro Sylvia Hämäläiselle toukokuun loppuun mennessä ilmoittautumisestasi, ja jo aikeistasikin ilmoittautua. Tietysti 27.6. asti saa ilmoittautua. Meidän järjestäjien on miellyttävämpi suunnitella kurssia, jos tiedämme, että sinne tulee osallistujia. Opiston kurssisihteerillä ei ole aikaa ilmoitella jokaisesta ilmoittautuneesta erikseen.

Ne, jotka eivät osaa suomea, ilmoittautuvat Tiina Oittiselle.

YHTEYSTIEDOT

Oriveden Opisto www.orivedenopisto.fi

orivedenopisto@kvs.fi

Koulutie 5, 35300 Orivesi

puh. 020 7511 511

Tiina Oittinen efsekretario@esperanto.fi

puh. 050 549 4709 (ulkomailta +358 2 230 5319)

Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi

F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere
puh. 050 321 4313 (ulkomailta +358 50 321 4313)

Tervetuloa

Sylvia Hämäläinen

Somere ni esperantistoj deziras renkonti samlingvanojn. Tio povas tre bone okazi en *Orivesi*, ĉu ne. Venos almenaŭ unu eksterlandano, la instruistino el Litovio *Gražina Opulskienė*. Legu pri ŝi en alia loko en ĉi tiu revuo. Ŝi instruos Esperante, kompreneble, kaj tio ja plaĉas al ni. Ĉijare jam dekomence ni aranĝos proprajn lecionojn en la finna por tiuj, kiuj tion deziras, kaj por komencantoj. Gražina aldone prezentos al nia tuta grupo sian landon kaj rakontos pri la tempo de L.L. Zamenhof en Litovio. Ni krom studado ankaŭ kantos, ludos kaj ekskursos. En la ĉambroj estas propra necesejo-duŝejo.

La kurso komenciĝos lunde 14.7. je 11.30 per lunĉo, post kio je la 13a komenciĝos la komuna malfermo por la institutaj kursoj. Nia Somera E-kurso finiĝos vendrede 18.7. per posttagmeza kafo ĉ. je 13.30.

KURSOKOTIZOJ, tri kategorioj

- 420 EUR, kompleta partopreno, kiu inkludas instruadon, loĝadon kaj manĝojn (matemanĝo, lunĉo, kafo, verpermanĝeto). Krompago pro unupersona ĉambro estas 100 EUR.
- 380 EUR instruado kaj manĝoj (sen loĝado)
- 316 EUR nur instruado. En la instituta restoracio eblas manĝi kaj pagi aparte.

ALIĜO

Aliĝofino 27.6.2014. Aliĝu rekte al Oriveden Opisto. Tiun daton 27.6. metis la instituto. **Por ni aranĝantoj ĝi estas tro malfrua. Bonvolu informi pri via aliĝo kaj eĉ intenco aliĝi ĝis la fino de majo** al Sylvia Hämäläinen. Kompreneble oni rajtas aliĝi ankoraŭ en junio ĝis 27.6. Estas pli agrable pretigi la programon, se oni

scias, ke venos kursoj kaj ke ĝi realiĝos. La instituta kontaktulo ne havas tempon por informi al mi pri ĉiu aliĝinto aparte, ĉar okazos samsemajne pluraj kursoj.

Tiuj, kiuj ne scias la finnan lingvon (el eksterlandoj) aliĝu al Tiina Oittinen.

Rigardu www.orivedenopisto.fi > kiellet > kesäkurssit > esperantokurssi.

KONTAKTOSCIJOJ

Oriveden Opisto www.orivedenopisto.fi

orivedenopisto@kvs.fi

Koulutie 5, 35300 Orivesi

tel. 020 7511 511

Tiina Oittinen eafsekretario@esperanto.fi

tel. 050 549 4709

Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi

tel. 050 321 4313

F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere

Bonvenon

Sylvia Hämäläinen

Opettajamme kesäkurssilla – Nia somerkursa instruistino



Kurssin opettajana on Gražina Opulskienė Liettuasta. Hän työskentelee lukion kirjastonhoitajana ja on jo kaksikymmentä vuotta opettanut samassa opinahjossa pakollista esperanton kurssia. Hän on naimisissa ja heilä on kaksi aikuislasta. Gražina suoritti tutkinnon Haagissa Kansainvälisessä Esperanto-instituutissa (Internacia Esperanto Instituto) ja sai viralliset "esperantonopettajan paperit" v. 1999 ja on siitä lähtien pitänyt kursseja useissa maissa. Hän on Liettuan Esperantoliiton hallitukses-

sa ja on kirjoitellut lehtiin artikkeleita. Hän on aikonut perustaa meidän kurssimme saduille ja lähinnä käyttää keskustelua. Lisäksi kuulemme mm. L.L. Zamenhofin vaiheista Liettuassa.

Nia instruistino estos *Gražina Opulskienė* el Litovio. Ŝi laboras kiel bibliotekistino en gimnazio kaj jam dudek jarojn instruas Esperanton kiel deviga esperantokurso en la sama lernejo. Ŝi estas geedziĝinta kaj ili havas du plenkreskajn gefilojn. *Gražina* trapasis en 1999 la instruistan ekzamenon en Internacia Esperanto Instituto en Hago. Post tio ŝi instruis la internacian lingvon en multaj landoj. Ŝi estas estaranon de Litova Esperanto-Asocio kaj skribas artikolojn en plurajn gazetojn. En nia kurso ŝi intencas uzi fabelojn kiel instrumaterialo kaj paroligi nin. Krome ni aŭdos kion L.L. Zamenhof faris en Litovio.

Afrikaj vizitantoj



Prezento en Sello. Foto: *E. Isheloke Byelongo*.

En decembro 2013 du gastoj el Sud-Afriko, sinjoroj *Elisée Isheloke Byelongo* (i.a. instruisto pri franca lingvo) kaj *Johan Köhler* (programisto), vizitis la urbojn *Hyvinkää*, *Helsinki* kaj *Espoo*. Veran vintron ili bedaŭrinde ne vidis, nur kelkajn manplenojn da neĝo kaj kelkloke glacian sur krutaj apudvojoj rokokoj. Kun la sezonoj kaj bestoj de Finnlando ili pli bone konatiĝis en la naturcentro *Haltia*, en *Nuusio*, Espoo, gvidataj de Saliko, *Sigi Kivistö* kaj ŝia nepino *Ellen*. La ĉefajn vidindaĵojn de Helsinki kaj la ofi-



Nomtago de Seija. Foto: Saliko.

cejon de EAF montris al ili FEJO-ano *Tuomas Latva-Pirilä*. Rondveturadon en Hyvinkää per aŭto afable ebligis S. Kivistö. Dum ĝi la grupe-to vizitis recikladan centron, preĝejon kaj la urban bibliotekon, en kies vestiblo staris malgranda ekspozicio pri diverslingvaj kristnaskaj kaj jarŝanĝaj kartoj kaj salutoj. En la granda biblioteko la stokoj de libroj, diskoj, filmoj kaj la diversaj ejoj por infanoj, studentoj, gazetlegantoj kaj retumantoj imponis ĉiujn. Ili vidis ankaŭ la Lucia-feston de la svedlingva lernejo de Hyvinkää en *Gamla Kyrkan*.

En la vestibla halo de *Sello*, antaŭ la biblioteko de Espoo, la gastoj kontribuis al la Tago de Esperanta Literaturo rakontante pri la lingvaj situacioj de Sud-Afriko kaj Kongo. *E. Isheloke Byelongo* prezentis ankaŭ sian libron "Eĥoj el Bembujo", kiu priskribas la vivon kaj kutimojn de la Bembe-etno, kaj sian manuskripton "Historio de la Esperanto-Movado en Sud-Afriko". Surprizis la aŭskultantojn, ke en Kongo estas parolataj pli ol 400 lingvoj, el kiuj neniu povas esti elektata kiel lingvo de edukado en lernejoj. La tuta ŝtato devas uzi la francan lingvon kiel oficialan, komunan lingvon kaj kiel lernejan lingvon ekde la plej frua aĝo de la lernantoj.

La afrikaj gastoj kun Tuomas kaj Saliko estis invitataj soleni la nomtagon de *Seija* en privata hejmo ekster Hyvinkää kaj kafumi/teumi en la hejmo de *Tina*, filino de Sigi, kaj ŝiaj gefiloj *Ellen*, *Hugo* kaj *Jaan*, kiuj ĉiuj partoprenis en la Esperanta interparolado.

Antaŭ ol veni en Finnlandon la gastoj vizitis *Hans Bakker* kaj la Centran Oficejon en Nederlando. De Finnlando ili daŭrigis al Belgio kaj Francio, de kie reen al Sud-Afriko. Ilia tuta vojaĝo daŭris 2 semajnojn. Kaj la vojaĝantoj kaj gastigantoj multe lernis.

Saliko

La afrika esperantistaro pretas inviti la mondon

La 4-an de januaro finiĝis la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto, kiu dum unu semajno disvolviĝis en la benina urbo Kotonuo kun 32 partoprenantoj el 11 landoj. Krom la afrikaj landoj Benino, Burundo, Ebur-Bordo, Kamerunio, Niĝerlando, Senegalo, Sud-Afriko kaj Togolando, reprezentitaj estis ankaŭ Haitio, Svedio kaj Svislando. Inter la partoprenantoj estis kvar el la sep membroj de la Afrika Komsiono de UEA, interalie ĝia kunordiganto *Adjévi Adjé*, kaj tri el la dek ankoraŭ vivantaj afrikaj kongresanoj de la jubilea UK en Varsovio en 1987. Ekstermovadan prestiĝon donis la partopreno de la vicurbestro de Kotonuo, s-ro *Augustin Houessinon*, kiu parolis en la inaŭguro kaj la fermo.

La kongreso estis kunorganizita de tri partneroj: Afrika Komisiono de UEA, Asocio de Beninaj Esperantistoj (landa asocio de UEA) kaj la svisa-benina neregistara organizaĵo "Scio Sen Bariloj". En la programo estis 18 prelegoj kaj unuhora Skajpa kunveno kun la Novjara Renkontiĝo en Germanio. En la Silvestra Vespero oni dancis, dum la las-

ta vespero, la 3-an de januaro, estis nacia vespero, en kiu prezentiĝis tri muzikgrupoj. Okazis ankaŭ sesio de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA.

La kongresa rezolucio esprimis dankojn al UEA, Institucio Hodler '68 kaj multaj individuaj esperantistoj el ĉiuj mondopartoj, kies subteno ebligis okazigi la kongreso, 17 jarojn post la 4-a Afrika Kongreso en Tanzanio. La rezolucio emfazis la neceson de internaciaj Esperantorenkontiĝoj kiel rimedo por spertiĝo kaj lingva perfektigo de la movado en Afiko. Tiucele oni esprimis pretecon okazigi IJK, UK kaj/aŭ IL-EI-konferencon en Afriko, eĉ jam en 2016. La rezolucio pledas ankaŭ por modernigo de la Afrika Oficejo de UEA en Lokossa, Benino, kiel montrofenestro de Esperanto en Afriko.

Pli da informoj pri la 5-a AKE, kun fotoj kaj ĉiuj numeroj de ĝia bulteno "Kotona Gazeto", troviĝas en la blogejo de *Mirejo Grosjean*: <http://mirejo3.blogspot.com/2013/12/kvina-afrika-kongreso.html>

[GK 531]

Kvar prelegoj en la 40-a Malferma Tago la 10-an de majo

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas vizitantojn al la Malferma Tago, kiu okazos jam por la 40-a fojo sabaton, la 10-an de majo. La unua Malferma Tago de la CO estis en novembro 1994 kaj ekde tiam tiu ĉi ŝatata aranĝo okazis dufoje en ĉiu jaro.

Kun kvar prelegoj la programo estos pli ampleksa ol kutime. Sub la titolo "Interlingvistiko – ĉu nur intelekta ludaĵo?", *Detlev Blanke* prezentos scienc-stragiajn konsiderojn kaj kelkajn germanajn spertojn tiurilate. En sia prelego "La gramatika domo de Esperanto" *Wim Jansen* uzos la domon kaj ĝiajn konstruaspektojn kiel metaforon por prezenti trajtojn de la Esperanta gramatiko el la vidpunkto de la funkcia gramatiko.

Lige kun la 90-a datreveno de la verkistino *Marjorie Boulton*, tri tagojn pli frue, *Humphrey Tonkin* parolos pri ŝi kaj ŝia verkaro. Fine, sub la titolo "Nefertito kaj Eĥnatono – drama epizodo el la egipta historio", *Wera Blanke* prezentos apenaŭ konatajn eventojn antaŭ 3 mil jaroj en la antikva Egiptio.

En la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj kaj de filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

[GK 533]

Jukka Nikoskelainen estas for



Jukka Nikoskelainen.
Fofoto: Studio Brahe

Jukka Nikoskelainen forpasis subite la 21-an de decembro 2013. Li naskiĝis 23.3.1943 en *Kontiolahti* en orienta Finnlando, sed transloĝiĝis jam kiel knabo al Turku, kie li faris la abituriantan ekzamenon. Li studis medicinon kaj poste fariĝis profesoro de internaj malsanoj en

la universitato de Turku.

Jukka kun sia edzino *Eeva* komencis lernadon de Esperanto en januaro 2007 kaj jam post kelkaj monatoj membriĝis en la Esperanto-societo en Turku (EST). Ili konatiĝis kun la fe-

nomeno Esperanto jam en la 60-jaroj kaj estis nun feliĉaj por havi eblecon vere lerni la lingvon.

Ili tuj komencis partopreni en Esperantaj aranĝoj kaj en Finnlando kaj eksterlande kaj vizitis i.a. la somerajn kursojn en Valamo, la UK-on en Kubo, BET-renkontiĝojn kaj Italajn kongresojn. Ni ĉiuj bonvenigis la aktivan paron en niaj rondoj kaj estis kontentaj, kiam Jukka en 2011 fariĝis estrarmembro de EAF, en la estraro de EST li jam membriĝis pli frue.

Lastsomero en la Itala kongreso Jukka sukcese faris la KER-ekzamenon en la plej alta nivelo. La diplomon li ricevis en nia jula festeto du tagojn antaŭe. Tiu lasta renkonto kun li estis tre gaja kaj pozitiva: Jukka rakontis lerte kaj entuziasme pri la vojaĝo kaj partopreno en la somera kongreso al Italio.

Kara Jukka, vi mankas al ni kaj vi restos en niaj memoroj por ĉiam. Ni funebras kun via familio.

Tiina Oittinen
prezidanto de EST

Jen memoroj de amikoj pri Jukka:

Kiam Jukka kaj Eeva venis al la elementa kurso, ili estis tiel entuziasmaj, ke ili preskaŭ englutegis novajn sciojn pri la lingvo. Mi devis "bremsi" kaj averti: Oni ne povas engluti ĉion sen "digesti". Kun dankemaj pensoj

Leena T.



Li kreis pozitivan, afablan kaj amikecan atmosferon al la kunvagantoj. Dankeme, sopirante

Anja L.

Ludwik Zamenhof estas nia spirita patro, kaj ni kiel gefratoj en la internacia familio iniciatita de li. Jukka estis tia samideana frato. Li lasis al ni luman memoron, kiu admonas nin daŭre fosi nian sulkon.

Tuomo Grundström
prezidanto de EAF

Hilkka Galle (4.6.1932–27.11.2013)

La 27-an de novembro 2013 forpasis *Hilkka Galle*, longtempa membro de Esperanto-klubo de Lahti kaj EAF. Hilkka komencis studi Esperanton en la fino de la 1950-aj jaroj en la kursejo en *Vääksy* kaj poste ŝi partoprenis studsemajnon en Danio kie ŝi dum la Universala Kongreso en Kopenhago 1962 konatiĝis kun sia estonta edzo *Roland* el Germanio kaj la paro fondis hejmon en Germanio. Tie naskiĝis filino *Ulla*, denaskeparolanta esperantisto. Post kvar jaroj Roland tamen mortis kaj Hilkka kun filino revenis al Finnlando.

Hilkka diligente aktivadis en la Esperanto-klubo de Lahti kaj partoprenis en multaj Esperanto-kongresoj kaj -eventoj precipe en

Eŭropo. Post 80-jariĝo ŝiaj fortoj ne permesis of-partoprenon en la kaj post kelkmonata grava maisano si mortus en malsanulejo je 27.11.13, ŝia propra nomtago.

La funebra ceremonio okazis en Lahti je 19.12.2013 en intima rondo de filino Ulla, kelkaj geparencoj, najbaroj, amikoj. *Börje Eriksson* transdonis la kondolencojn de la Esperanto-klubo de Lahti kaj EAF kaj ĉeestis ankaŭ la memorfeston en la hejmo de Hilkka. Ni honoras la memoron de Hilkka.

BE



La Tago de Johan Ludvig Runeberg

La Tago de *Johan Ludvig Runeberg* (1804–1877) estis en la kvina de februaro. Li staras sur la naciromantika ŝranko de Finnlando tiel solide, ke bedaŭrinde multaj ankaŭ ĉi tie konas el lia verkaro nur ”La kantoj de subleŭtenanto Ståhl”, majstran priskribon de okazaĵoj kaj personoj el la t.n. Finnlanda milito (1808–1809), kiu disigis nin de Svedio (disiĝo de Ruslando sekvis post 110 jaroj). Niaj erudiciaj svedaj amikoj eventuale atentis literaturhistorian aserton, ke Runeberg estis la plej brila manipulanto de la sveda lingvo en la unua duono de la 19-a jarcento. Kiu esploris sian Finnlandan psalmlibron, trovis ke Runeberg grave kontribuis al ĝi. Vidu www.runeberg.net

Plej bela parto de la Runeberga poezio estas liaj lirikaj poemoj, el kiuj manpleno vivas klasike kiel kantoj popolkantecaj, ekz-e ”Cigno”, ”Ĉe fonto”, ”Junulin’ revenis de l’amato”. Sube mi provas redoni specimenojn.

Al esperantistoj estas interese scii, ke lia nepo, instruisto kaj verkisto Nino Runeberg (1874–1934) estis la unua prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, fondita 28.4.1907.

5 Staras du florpotoj ĉe l’fenestro;
unu el la mirtoj Laŭra flegas,
sed la dua sekas kaj forvelkas.
Kial unu kara, ne l’alia?
Ĉar ne tiujn donis sama homo,
la unuan donis la amato
kaj la duan l’edzo, maljunulo.

8 Inter freŝaj floroj en bosketo
iris bona junulino sola,
kaj ŝi plukis rozon, al ĝi diris:
”Bela floro, se vi povus flugi,
volus sendi vin mi al karulo
mia, kun ĉi tiuj du mesaĝoj
en flugilojn viajn surskribitaj:
Unu petas ke li kison donu,
la alia ke li vin resendu.”

11 Vi papilioj kaj
floroj kun ridet’,
arboj kun foliar’
velku, ho velku tuj!
Bildoj de juneco,
bildoj de amsento,
velku, ho velku tuj!
Vendit’ mi al oldul’
ne rajtas ami vin.

16 Tri konsilojn donis al filino
panjo: Ne sopiri, malkontenti
kaj neniam kisi iun knabon. –
Panjo, se l’filino vin obeas,
kaj ne rompos la konsilon
lastan,
ne obei povas ŝi l’unuajn.



Aatu Moilanen 80-jara



Aatu Moilanen.

La 28-an de januaro 2014 d-ro *Aatu Moilanen* fariĝis 80-jara. Post blindullernejo en Kuopio Aatu kune kun la amikoj *Arvo Karvinen* kaj *Raimo Tanskanen* daŭrigis siajn studojn en Helsinki.

Tage ili laboris, vespere studis, libertempe kantadis publike kaj private. Kantado ja estis ilia komuna hobia ekde juneco.

Finnlando iĝis konata al Aatu, kiam li laboris kiel konsilanto por viddifektitoj. Unu el liaj taskoj estis viziti hejmojn kaj gvidi parencojn en la edukado de infanoj. Plej laste Aatu laboris en la porblindula biblioteko *Celia* kiel estro de lernomateriala produktado. Post pensiigo li rekomencis studi. Lia fako estis pedagogio. Efektive la studado estis familia entrepreno. La laboro kaj entuziasmo de la edzino *Gunvor* estis neanstataŭigebla helpo. La doktora disertacio pri evoluo kaj edukaj celoj de blindullernejoj

dum la jaroj 1865–1939 okazis somere 2006. Nuntempe viddifektitoj studas integriĝe kun aliaj lernantoj-studentoj. Kvankam la evoluo plejparte estas pozitiva, Aatu vidas problemojn almenaŭ koncerne fizikan edukadon. – Ege bedaŭrinde estas, ke kelkaj viddifektitaj infanoj estas eĉ liberigitaj de gimnastiko kaj sporto. Ekposedo de la korpo ege gravas por scipovi moviĝi sola. Por la propra memstareco estas grave, ke oni povas moviĝi sendepende, diras Aatu.

Aatu esperantiĝis en 1955 partopreninte elementan Esperantokurson sub gvido de *Oskari Lehtivaara*, membriĝis en Steleto en 1956. Ekde 1992 li estas estrarano de Steleto kaj ekde 1995 LIBE-delegito.

La koro de Aatu ĉiam batalis kaj ankoraŭ batalas por la bono de viddifektitoj. Lia bonkora personeco gajnis amikaron, kiun li fidele kontaktadas. Aatu daŭre kantas en korusoj kaj private.

Okaze de la datreveno ni dankeme salutas la geamikojn Aatu kaj Gunvor kaj deziras sanon kaj vivigojn.

Ritva Sabelli

Kutsu Suomen opettajien esperantoyhdistyksen vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n (ELFI) sääntömääräinen vuosikokous pidetään 8. maaliskuuta 2014 klo 10.30 alkaen NNKY:n kokoustiloissa (osoite: Vähä Hämeenkatu 12, Turku). Käsitellään vuosikokoukselle kuuluvat asiat, ja keskustellaan aiheesta *Miten hoidamme etäopiskelun nyt Kansanvalistusseuran Etäopiston lopettamisen jälkeen?* – Kaikki jäsenet ja asiasta kiinnostuneet tervetuloa!

Kunvoko al la jarkunsido de ELFI

La laŭstatuta jarkunsido de **Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj** (ELFI) okazos sabaton la 8-an de marto 2014 je la 10.30 en salono de NNKY (adreso: *Vähä Hämeenkatu 12, Turku*). Estos traktataj laŭstatutaj jarkunsidaj aferoj, kaj diskuto pri *Kiel aranĝi distancinstruadon nun post la finiĝo de la Distancinstituto de Kansanvalistusseura?* – Ĉiuj membroj kaj interesitoj estas bonvenaj!

– *La estraro*

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki_jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantoklubi / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu_aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletokolumbus.fi ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 5494709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg-seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperanto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti jormato35@gmail.com.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2014

Nro	Limdato	Aperas
2/2014	31.3.	en aprilo
3/2014	31.5.	en junio
4/2014	1.9.	en septembro
5/2014	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezjo

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 EUR	1/1 sivu/paĝo 50 EUR
1/2 sivua/paĝo 60 EUR	1/2 sivua/paĝo 30 EUR
1/4 sivua/paĝo 40 EUR	1/4 sivua/paĝo 20 EUR

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Itella Green

Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi 6.–7.9.2014

Ĉi-jare estas denove vico de la Esperantoklubo de Iisalmi aranĝi la Aŭtunajn Tagojn. Nin vokas tie la energia prezidanto de la klubo, *Onni Kauppinen*, kun la aliaj klubanoj. La programo de la tagoj estos multflanka kiel ĉiam kaj enhavos kaj artajn, kulturajn kaj turismajn erojn.

Sabatmatene estos rondirado en la urbo, kiam ni vizitos i.a. la plej malgrandan biertrinkejon de la mondo. Poste *Reino Eriksson* prelegos al ni pri aktuala temo. Posttagmeze ni rondveturos per buso en la ĉirkaŭaĵo de Iisalmi kaj vidos tiam akvomuŝilon kaj aliajn belajn lokojn. Vespere ni ĝuos la koncerton de la fama Esperanto-ensemblo *Asorti* el Litovio. Kaj por ne forgesi la kulinaran flankon: dum la tagoj eblas gustumi specialan esperantokolbason.

Ankaŭ dimanĉe ni aŭdos pri interesaj aferoj, kiam *Olli Pajula* rakontos al ni pri ne-indentigitaj flugantaj objektoj (nifoj). Nova rondveturo alportos nin al la pejzaĝoj de la verkisto *Juhani Aho*.

La ĉefa tranoktejo kaj kunvenejo estos la hotelo *Seurahuone* de Iisalmi, kaj en la bieno de Onni troviĝos amasloĝejoj. Kaj nature Onni aranĝos pro-

gramon por tiuj, kiuj deziras kaj povas resti pli longe en la regiono: antaŭaj kaj postaj AT-aranĝoj atendos vin!

Pliaj informoj en la sekva numero de Esperantolehti kaj en niaj retpaĝoj.

Seuraavat syyspäivät ovat jälleen Iisalmessa, jossa paikallinen yhdistys on aloittanut valmistelut. Ohjelmassa on niin taidetta, kulttuuria kuin matkailua. Kiertoajeluilla näemme mm. mielenkiintoisen vesimyllyn ympäristöineen ja vierailemme Juhani Ahon maisemissa. Illalla meitä viihdyttää liettualainen esperanto-musiikkiryhtye Asorti. Ja luvassa on myös erityistä esperantomakkaraa! Majoitus- ja kokoustilat ovat hotelli Seurahuoneella Iisalmen keskustassa, mahdollisuus myös yhteismajoitukseen. Lisätietoja seuraavassa Esperantolehdestä ja nettisivuillamme. Tervetuloa useammaksikin päiväksi, Iisalmen yhdistys puheenjohtajansa Onni Kauppisen kanssa järjestää ohjelmaa myös ennen ja jälkeen.

Notu jam nun la datojn! Bonvenon!

Esperantoklubo de Iisalmi kaj EAF

Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

- 8.–9.3. Vintraj Tagoj en *Turku*
- 6.–9.6. 91-a Germana kongreso (<http://esperanto.de/gek>) en Erfurto (Turingio), Germanio
- 28.6.–4.7. 50-a BET en *Jelgava*, Latvio (<http://esperanto.lv>)
- 6.–12.7. 10-a Eŭropa Esperanto-Kongreso en *Rijeka*, Kroatio (<http://eeu-kongreso.webnode.com/>)
- 12.7.–20.7. SES-2014 kaj TEVA-kongreso en *Nitra*, Slovakio (<http://ses.ikso.net/>)
- 14.–18.7. Somera kurso en *Orivesi*, (vidu artikolojn en ĉi tiu numero)
- 18.–25.7. 70-a IJK en *Fortaleza*, Brazilo (<http://ijk.brazilo.net/>)
- 26.7.–2.8. 99-a UK en *Bonaero* (Buenos Aires), Argentino (www.uea.org/kongresoj/uk_2014.html)
- 23.–30.8. 81-a Itala kongreso, *Fai de la Paganella* (Trento), Italio (<http://kongreso.esperanto.it/81/>)
- 6.–7.9. Aŭtunaj Tagoj en *Iisalmi*

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Aineisto 31.3.2014 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 31.3.2014 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.